

Hilary (Bill) Chapman

Ni ricevis la malgajan novaĵon ke Hilary Chapman forpasis en 21-a majo. Pluaj informoj estas ĉe la dua paĝo de la bulteno.

Nekrologo aperos en estonta eldono,

Kluba Programo:**majo:**

- 1 Lenio Marobin: Germanaj kaj italaj vilaĝoj en suda Brazilo
- 8 Derek Roff: Tradukado de bildstrioj
- 15 Stefano Keller: UEA en Ĝenevo: lingaj homaj rajtoj
- 22 Louis v. Wunsch-Rolshoven: Kiel lingvistoj kaj aliaj sciencistoj misfamigas Esperanton
- 29 Marc Bavant: La Elama – lingvo parolata en Irano antaŭ alveno de la Persoj

junio:

- 5 Trevor Steele: Pri la libro "Kvazaŭ ĉio dependus de mi"
- 12 Ite Tytgat: Detekti la viruson
- 19 John Wells: Lingva seminario
- 26 Fransoazo Noireau: Koncerto kun kvizo "Violonoj de la mondo"

Esperanta Kalendaro:

Pro la nuna monda krizo, preskaŭ ĉiuj eventoj estas nuligitaj, prokrastitaj, aŭ okazos per interreto. Por ĝisdatigoj, kontaktu la organizantojn:

<https://uea.org/kongresoj>
<https://britakongreso.org/>
<https://www.tejo.org/>
<http://www.satesperanto.org/> (RETA!)

Krome, retaj kunvenoj en Esperanto estas listigitaj en <http://eventaservo.org>

**La Londona Esperanto-klubo dum la monda epidemio**

Kiam en marto iĝis pli fortaj la voĉoj kontraŭ uzado de la subtera fervojo multaj el niaj membroj, ĉefe tiuj iom aĝaj, komencis havi dubojn partopreni la ĉeestajn kunvenojn. Pro tio la 20a-n de marto okaze de teoria kunveno ĉe IBIS Shoreditch, mi mem kaj Anna Lowenstein anstataŭ veturi tien, decidis eksperimenti per reta kunveno. Ni provis iun programon kaj ankaŭ la tradician skajpon. Sed tiam ni malkovris ke la komputilo de Daniel, fidela ĉeestanto en IBIS, ne sukcesas kunligiĝi. Dum la posta semajno ni pli eksperimentis kaj la unua vera kunveno kun multaj partoprenantoj okazis la 17-an de marto, kiam prelegis Diccon Masterman, konata angla esperantisto nun loĝanta en Usono. Li rakontis pri sia laboro kiel Konstanta Kongresa Sekretario kaj estrarano de UEA kaj klarigis siajn ideojn por solvi la nunajn problemojn de UEA. Diccon mem luktis kun sia komputilo, sed post 20 minutoj sukcesis eniri la kunvenon.

Jam la postan fojon, la 3-an de aprilo, ĉio iris pli glate kaj Stefan MacGill prelegis pri sia vojaĝo al Nov-Zelando kaj montris amason da fotoj.

La 10-an de aprilo okazis la tradicia lingva seminario de John Wells, interesa kiel kutime. Intertempe la nombro de partoprenantoj jam superis 30.

La 17-an de aprilo estis la vico de Katalin Kovats, kiu prelegis pri la nova projekto de www.edukado.net, "Kunpaŝado" kaj ankaŭ ŝi superŝutis nin per fotoj.

La 24-n de aprilo prelegis la prezidanto de la irana landa asocio de UEA, Keyhan Sayadpour, kaj la partoprenantoj altiĝis al 40.

La programo de majo kaj planita por junio (ankoraŭ okazanta) estas apude. En la mezo de majo ni atingis 57 partoprenantojn.

La nombro de partoprenantoj daŭre altiĝas kaj ili venas el la tuta mondo kaj eĉ el Orienta Londono. Multaj membroj londonaj kaj ankaŭ britaj esperantistoj, kiuj normale ne sukcesas partopreni, aperis en ĉi tiuj retaj kunvenoj. Entute tre bela sperto. Se vi neniam partoprenis kaj tamen havas komputilon, sendu mesaĝon al lek.sekretario@gmail.com.

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere.
Dum la Kronviroza krizo,
kunvenoj okazas per la reta
sistemo Zoom, komenciĝante je
19h (UTC +1).
Por ricevi la alirkodojn, bv. sendi
retmesaĝon al
lek.sekretario@gmail.com.

Niaj normalaj aranĝoj estas
sube:

La kunveno okazas en iu el du
lokoj:
Old Diorama Arts Centre, 201
Drummond Street, NW1 3FE
(por kunveno kun programo);
Ibis London City - Shoreditch
Hotel, 5 Commercial St, London
E1 6BF (por diskutvespero)
(Bus kaj trajn-informoj aperos
en la bulteno kiam denove
stariĝos normalaj aranĝoj)

Lokaj grupoj: Orientlondono: Roy
Simmons 01473-461346
rokeby@globalnet.co.uk;
Sudlondono: Gregory Porilo
020-8672 8095
esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: Roy Simmons
(vidu supre); Sudorienta: Kevin
Murray, 11 Leybourne Ave, West
Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-
345779 yarrump@gmail.com.

Hilary ("Bill") Chapman 1950-2020

Nia amiko Hilary Chapman (ankaŭ konata "Bill"), kiu esperantistiĝis nur 16-jara, bedaŭrinde forpasis pace ĵaŭdon la 21-an de majo 2020. Dum unu jaro li bataladis kanceron, kun siaj kutimaj gajeco kaj optimismemo. Malgraŭ granda klopodado izoligi lin, Bill bedaŭrinde devis enhospitaliĝi pro KOVIM-19. Plena nekrologo aperos en La Brita Esperantisto. Pro la pandemio, ŝajnas neeble, ke eksterfamilianoj povos partopreni la funebraĵojn. Se la situacio ŝanĝiĝos, mi diskonigos la informojn.




La familio de Bill elektis du bonfarajn asociojn al kiuj oni povus mondonaci memore al Bill. Tiuj estas:

- [Citizens Advice Bangor](#) (Konsila servo por civitanoj en la urbo Bangor), kiu proponas senpagajn, sendependajn kaj konfidencajn konsilojn al homoj kun zorgoj leĝaj kaj financaj, kaj de kiu Bill estis kuratoro.
- [Awy'r Las Gogledd Cymru - Blue Sky North Wales](#), bonfaraĵo de la nacia sanservo, kiu subtenas precipe la hospitalajn sekciojn kaj sanservojn en la komunumo, kiujn la NHS (Nacia sanservo) en Norda Kimrujo ne povas provizi.

Tim Owen, skribinte en retejo de EAB

Hilary inter siaj grandaj laboroj por la Esperanta movado prezentis la Zamenhofan vesperon en la klubo en decembro 2018



Funkciuloj: Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.
Konsilantaro: Chris Lewis (Prezidanto), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Renato Corsetti (Sekretario kaj Programo), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Roland England, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).
Adresoj: Chris Lewis: chrisandelifewis@yahoo.co.uk; Renato Corsetti: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.
Kluba retejo: <http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>